



Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET


N-ro 3
1969

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
ĈEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-periodo
35-a (40-a) jaro
Monata

Løten Atendas vin

LA 21-AN KAJ 22-AN DE JUNIO



Løten vilaĝo kun ĉ. 1 000 enloĝantoj, situas ĉirkaŭ Løten stacidomo. La vilaĝo estas la centro de la komunumo. En tiu vilaĝo la partoprenantaro de la 41a Norvega Esperantokongreso solene inaŭguros Esperantovegen, la tria strato en nia lando kun nomo ligita al nia afero.

Kiel ĉiu norvega esperantisto nun scias, Norvega Esperantista Ligo aranĝos sian 41an kongreson en Budor Turisthytte sur la montebenaĵo Hedemarksvidda, sabate la 21an kaj dimanĉe la 22an de junio 1969. Budor situas en Løten komunumo.

Eble vi ne scias kie Løten estas?

Mi tuj informas ke Løten situas en Hedmark gubernio, mezvoje inter Hamar kaj Elverum, kaj sur la limo inter la agrardistrikto Hedemarken kaj la arbarvalo Østerdalen.

Antaŭ la nomo estis Løiten, kaj ĉu mi eraras supozante ke vi koncerne la nomo en unua vico pri-pensas produktojn de la famekonata Løiten Brænderi?

Gia ĉefa tasko nuntempe estas produkti sukron, konfitaĵon kaj marmeladon. Nur dum mallonga tempo post la terpomrikolto, oni distilas alkoholaĵon, kaj mi bedaŭras, ke oni ne vendas eĉ unu guton al vizitantoj, — eĉ ne al ni esperantistoj.

Aŭ eble vi kelkfoje sur la matenmanĝotablo observis la vorton: Løiten Meieri sur kovrilpapero de butero aŭ fromaĝo.

Pensu tiam, kara leganto, ke eble la bovino el kies lakto via fromaĝo aŭ butero fabrikiĝis, nut-


ris sin de herbo sur la montpaŝtejo ĉirkaŭ Budor!

La grandparto de la areo de Løten komunumo estas arbaroj, — propraĵo de ĉiuj bienuloj kaj kamparanoj kiuj ekspluatas la arbarojn en formo de «bygdalmenning» (Privata kooperativa sistemo).



La
prezidanto
de
LKK.
Per Johan
Krogstie.

Kiam mi informas ke oni el tiuj vastaj arbaroj eksportas grandan kvanton de trunkaro kaj ĉar-pentoligno po jare, kaj ke en Løten estas fabriko (Klevfos Cellulose & Papirfabrik A.s) kiuj el la trunkaro produktas celulozon kaj paperon, cetere fabriko (A.s Hedpall) kie oni faras paledojn kaj lignajn pakmaterialojn, mi menciis la plej gravajn industriojn de Løten. (daŭr p. 32)



Jen la glumarko por la 41a Norvega Esperantokongreso. Ĝi estas havigebla en la kongresejo.

Norvega Esperantisto ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach,
Hans Amund Rosbach.

Adreso de la redakcio: Hulderveien 17 B,
N-1700 Sarpsborg. — (Limdato por
manuskriptoj: la 20 en la monato
antaŭ la apero.

Abonprezo: En Norvegujo kaj ekster-
lando: n. kr. 8,—.

Anonprezoj: 1/4 paĝo kr. 150,—,
1/2 p. kr. 75,—, 1/4 p. kr. 38,—,
1/8 p. kr. 19,—.

Kongreso - gazeto kaj tempo

Ĉi tiu numero estas dediĉita al la somera kongreso de NEL. Oni povas miri, ke jam la marta numero estas tiucela. Sed vidu, kion skribas la iniciatanto al la kongreso en letero al la redakcio: «plej konvene por n.ro 3, kiu verŝajne aperos la lastajn tagojn de aprilo . . .»

Kial la gazeto tiel malfruas? Li do kalkulas je unu monata prokrasto, kaj tio estas multo. Super ĉi tiuj linioj, en la «kapo» staras jena frazo: «Limdato por manuskriptoj: la 20 en la monato antaŭ la apero.» Sed, bedaŭrinde, multaj neglektas tion. Hodiaŭ, la lasta tago de februaro, 8 tagoj post la limdato, nur malmultaj manuskriptoj alvenis. Kaj la redaktado devas okazi en limigita libertempo. Ĝi postulas plurajn laborhorojn. Kaj ĉiu manuskripto kiu alvenas post la limdato, kaŭzas ekstrejn

laborhorojn. Morgaŭ la manuskriptoj devus esti ekspedataj al la presejo, ĉar ankaŭ kompostado, korektado, presado kaj ekspedo postulas tempon. Ni diru, ke la kompostado postulas semajnon. La korektado — la presejo sendas presprovaĵon la la redaktoro, kiu denove uzas liberajn horojn por tio, kaj ne ĉiam li havas liberan vesperon en la tago kiam venas la presprovaĵo — nova semajno. Presigo, ekspedo al Oslo, ekspedo al la abonantoj — kaj tempo uzata de la poŝto por atingi al la abonanto, certe almenaŭ nova semajno. El tio evidentiĝas, ke se iu ajn neglektas la limdaton, la numero devas malfruiĝi.

De tempo al tempo venas el eksterlando informoj pri konkursoj ktp, kun sia limdato. Pro la tro ofta malfruiĝo de nia gazeto, ni ofte ne povas informi pri tiuj. Do, amikoj, memoru la limdaton, sendu vian materialon ĝustatempe. Kaj ne atendu, ke informoj ktp alvenintaj post tiu tago, trovos sian lokon en la gazeto.

Red.

*Biblia Koresponda Kurso
«LA NAVIGANTOJ»*

kaj diversaj aliaj evangeliaj eldonaĵoj estas senkoste havigeblaj ĉe Esp.-Misio, Sveda sekcio de KELI, Box 7, S-690 51 Östansjö, Svedujo.

(daŭr de p. 30)
LØTEN ATENDAS VIN . . .


Tra Løten ek de la pratempo kondukis la plej mallonga vojo de Oslo al Trondhejmo. Pri tio atestas postsignoj de pilgrimoj survoje al la ĉerko de St.Olav.

Sur Rokoberget apud tiu pilgrimvojo, estas ruino de la St.-Mikaelpreĝejo, kie en la mezepoko la migrantoj al la ĉerko de St.Olav en Nidaros kutimis tranokti dumvoje. Hodiaŭ ankaŭ granda parto de la trafiko en nord—suda direk-

to kondukas tra Løten, — aŭ motorvoje, aŭ fervoje.

Vi kiuj intencas partopreni en la 41a Norvega Esperantokongreso, alvenos aŭ per propra aŭtomobilo, aŭ per trajno al Løten stacidomo (Estas ankaŭ eble veni al Løten, per aŭtobuso de Hamar, al Løiten Brænderi haltejo, sed la alveno per trajno estas plej bona.)

Al tiuj kiuj alvenos en privataj aŭtomobiloj, mi rekomendas sekvi la mapon en ĉi tiu klariga teksto, kun la norveglingva subskribo:



Slik kommer vi til Budor. Tiuj kiuj intencas veni per trajno, povas plej bone vojaĝi de Oslo Ø. per trajno je h. 8.45, ĝi ekveturas de Hamar je h. 10.35 kaj alvenos Løten je h. 10.56.

Tiuj kiuj alvenis al Hamar per noktrajno de norde, ankaŭ povas post atendado en Hamar veni al Løten per tiu trajno.

B.v. nepre indiki en la aliĝilo kiamaniere vi alvenos, por ke ni sciu la precisan nombron kiuj bezonas taksion de Løten stacio al Budor (20 km.).

En Budor ni kolektiĝos je h. 12.00 kaj post kongresinaŭguro kaj lunĉo, komenciĝos la laborkunsidoj. Ili finos antaŭ la vespera festtagmanĝo kaj agrabla vesperprogramo, kie amatora grupo de Oslo Esperantoklubo prizorgos la distradon.

Se aliaj deziras kontribui, per kanzonkantado, sorĉaĵadoj k.t.p. ili estas bonvenaj kun sia arto.

Dimanĉmatene, post la matenmanĝo, ni kunveniĝos en Budor Sportskapell al diservo en la internacia lingvo, antaŭ ol ni daŭrigas la laborkunsidojn.

Tagmeze estos lunĉo, kaj poste eble daŭrigo de la kunsidoj ĉa. 1 horo. Por tiuj kiuj ne estas ligitaj al kongresa laboro, estas bonega ebleco al ekskursoj.

Proksimume je la 15.30 h. ni devas forlasi Budor.

Nun ni vojaĝos al Løten, al nova loĝkvartalo en la vilaĝo.

Tie ni solene inaŭguras ESPE-
RANTOVEGEN.

La komunuma estraro de Løten

decidis honorigi nian lingvon kaj aefron per tiu gesto, kaj por krei la ĝustan atmosferon, Løiten Sangforening kaj Ådalsbruk Musikkforening alvenos por asisti nin dum la ceremonio.

Ni esperas ke tiu okazintaĵo, kiu estas grava propagando por Esperanto disvastiĝos per televido kaj gazetare.

La programo finiĝos en bona tempo por ke oni atingu la trajnon al Oslo, kiu ekveturas de Løten je h. 17.40 kun alveno en Oslo Ø. je h. 20.15.

Nun mi esperas ke vi estas sufiĉe informita pri la programo, — ni ĉiuj esperu pri bona vetero dum nia kongreso.

Al ĉiuj mi esprimas koran bonvenon al la 41a Norvega Esperantokongreso. *Per Johan Krogstie.*

Norvega Kroniko

La Esperantoklubo de Bergen jarkunvenis la 15an de januaro. Kristian Sivertsen elektigis kunvengvidanto.

La sekretario legis la jarraporton, kaj la kasistino la jarbilancon, kiuj ambaŭ estis aprobitaj.

La elektoj de la estraranoj donis jenajn rezultojn:

Prezidanto Åshild Birkenes. Vicprezidanto Doris Birkelund. Sekretario Kristian Sivertsen. Kasistino Annemor Jæger Bye. Estrarano Lilly Davanger. Anstataŭantoj Leonora Sivertsen kaj Kjell Offerdal.

Kelkaj paragrafoj de la klubleĝo estis ŝanĝigataj. *Kr. Svt.*

Klubo Esperantisto en Oslo

La prez. John Berggreen precipe bonvensalutis la gekursanojn, Kunvenis la 5an de decembro 1968 kiuj estis invititaj.

Poste la prez. legis la Konvencion pri la Rajtoj de la Infanoj, kaj citis leteron datumitan 16/11. 68, en kiu la Norvega Registaro informis, ke ĝi jam subskribis la Deklaracion pri Homaj Rajtoj kaj preparas la ratifon de ĝi por efektiviĝo en 1969. Nur proks. 8 aŭ 9 el 125 landoj subskribis la Deklaracion, kaj verŝajne Norvegujo estos la unua kiu ratifas ĝin.

C. Støp-Bowitz, prez. de la Eksamina Komisiono, donis diplomon al John Berggreen, kiu plenumis la instruistan ekzamenon.

La Kluba Kantgrupo, akompanata per piano de Asbjørn Syslag, prezentis 4 belajn kantojn.

Kirsten Ek prelegis pri «Redd Barna» en Kabilio, Alĝerio. Tre interese ŝi rakontis pri la laboro inter la kabiliaj infanoj kontraŭ la okulmalsano trakomo. Ŝi ankaŭ montris serion de kolorlumbildoj pri la lando kaj la laboro en Kabilio.

Asbjørn Syslak ludis norvegan muzikon de Alnæs kaj Grieg.

La Teatra Grupo prezentis la tre amuzan skeĉon «La nova pantalono». Bonege ludis Kirsten Ek, Kari Kalsås kaj John Berggreen, kaj ili rikoltis fortan aplaudon. Brynhild Østmo reĝisoris la teatraĵon.

Raportis *Harda Danielsen*.

Korespondu!

Gekorespondantojn de 11 — 65 jaroj ni serĉas en Norvegujo. Respondo garantiata. Adreso: Esperanto, Box 25, *Mělnik*, Ĉeĥoslovakujo.

Gardenisto 22-jara, sekretario de Latva Junulara Turista Esperanto-Klubo, serĉas korespondamikon en via lando. Kolektas glumarkojn kaj bildkartojn. Interesiĝas ankaŭ pri fotoarto. Jánis Ruksáns, Blaumana 21—20, *Riga-11*, Latvio, U.S.S.R..

Hungara junulino, teĥnika desegnistino, ŝatus korespondadi kun norvegaj gejunuloj. Kolektas poŝtmarkojn, bildkartojn. Iros al la U.K. en Helsinki kaj ŝatus poste viziti vian landon. Emeŝe Kovács, Kuruc u. 62, *Debrecen*, Hungarujo.

30-jara iama maristo tre deziras korespondi kun skandinaviaj amikoj, pri ĉiuj temoj, interŝanĝi poŝtmarkojn, poŝtmarkojn k.t.p.. Joachim Gröschel, R. Breitscheidstr. 70, 66 *Greiz*, D.D.R. (Orienta Germanujo).

Bulgara instruistino deziras korespondi pri ĉiuj temoj. Penka Genĉeva Jorgova, *Kilifarevo*, Veliko Tárnova, Bulgarujo.

Luigi Severico, Via S. Maurizio 4, I—22.036 Erba, Italujo dez. kor. pri sporto, turismo, geografio,

moderna muziko, kolektas il. poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn. Estas 22-jara studento.

F-ino Alicja Stawarz, Gdynia 10, stv. Techniczna 3, Polujo dez. kor. pri ĉiu temo. Interŝ. bildkartojn, poŝtmarkojn, insignojn, gramofondiskojn. Estas 16-jara lernantino de Trafiko Teknikumo.

Bugoslaw Szuba, Brwinow, ul. Lilpopa Nr. 36 m 4, Polujo, pola inĝeniero dez. kor. pri filatelo, geodesio, turismo kaj inĝ. aferoj. Dez. interŝ. pm.

Vl. Hasala, S.K. Neumanna 37, Hodonin, Ĉeĥoslovakujo, estro de nova esp.klubo, dez. kor. kaj interŝ. pm., stampojn, bildkartojn, insignojn. Dez. al sia klubo specimenojn de gazetoj kaj libroj.

Esperantoklubo kun adreso P.K. 930, Ilute, Sofio Bulgario, dez. kor. pri diversaj temoj. La klubo havas ĉ 100 membrojn.

RECENZOJ

Edmond Privat: Vivo de Gandhi. Stafeto.

Edmond Privat persone estis amiko de Gandhi, kaj prelegis pri li en la svisa radio. Nun tiuj prelegoj estas kolektitaj al 160-paĝa libro, kiu enhavas 63 ĉapitrojn. Tio rakontas, ke ĉiu ĉapitro estas

tre mallonga. Ĉar la lingvaĵo de Privat estas flua kaj sen malfacilaj vortoj, kaj la serio origine estis radioprelegoj, la libro do estas libro, al kiu oni tre volonte iras por mallonga libera momento, kaj ĝi ankaŭ vere taŭgas pro instruo, perfektigi ktp.

La enhavo estas larĝa super-rigardo pri la vivo de tiu unika viro, kies celo estis liberigi subpremitojn sen elversi eĉ guteton da sango. Privat substrekas, ke Gandhi konsideris la diversajn grandajn religiajn samvalorajn. Sed li bedaŭrinde forgesas mencii, ke nepra kondiĉo de la senperforta programo, estas la kristanismo eĉ la kontraŭuloj, kiu malpermesis al ili respondi al senperforto per perforto. Verŝajne la Gandhia agado estus vana en Vjetnamio kaj Nigero. Tamen oni ja dezirus, ke tiaj homoj ankaŭ nun vivus!

R.

H. Maschler: La Necenzurita Humoro. Eld. Esperanto Ligo, Tel Aviv, Israelo 1968. Prezo kun afranko 14 steloj.

Malgranda kajero de 90 paĝoj, ofsetita, en kiu estas kolektitaj la politikaj spritaĵoj kiuj vivas en la «submondo» de la komunismaj landoj. Multaj estas ofendaj al la nun vivantaj politikistoj, ĉiuj al la komunisma sistemo. Kaj depende de tio, la leganto aŭ ne povas kaŝi sian ridon, aŭ ne povas subteni sian indignon. Kiel specimeno: «Se vi estus kondamnita je infero, kiun inferon vi preferus, kapital-

istan ĉu komunistan?» — «Certe komunistan!» — «Kial?» — «Ĉar certe mankos aŭ petrolo aŭ karbo por fari fajron.».

Haro.

Ruĝa signal-lanterno.
Gramofondisko kun muzik-
nota kajero kun la forte-
piano muziko. Aldono al
«El Popola Cinio».

Vere fremdeca muziko kaj kanta-
tado. Membroj el la Pekina Opero
kantas ĉin-lingve, kaj la akom-
pano enhavas tradiciajn ĉinajn
instrumentojn, nekonatajn al ni.
El muzika vidpunkto tial estas tre
malfacile juĝi, ĉar ni ne havas
ion, kun kiu kompari. La enhavo
de la kantoj — la teksto troviĝas
en esperant-lingva traduko en la
notaro — montras la defendovolon
kontraŭ Japanujo. La fremdaj
muzikinstrumentoj estas bilditaj,
kaj la ideogramaj notoj de tiuj
estas klarigitaj.

R.

«La junaj trezorserĉantoj»
kaj «La longa marŝo». Du
multobligitaj kajeroj por
esperantolernantoj.

Esperanto Teachers Association
certe sentis la mankon de taŭga
legaĵo por la novuloj, kaj iniciatis
eldonon de malgrandaj kajeroj.
La du unuaj numeroj estas have-
blaj ĉe B.E.A., 140 Holland Park
Avenue, London W 11, je prezo de
po du ŝilingoj.

La sovaĝa Kokino. Noveloj
eldonitaj de Neo Lao
Haksat-eldonejo.

La novelaro venas de tiu parto
de la mondo, kie oni devas ĉiam
mencii: «La pacama Lao-popolo
devas preni la armilojn por batali
kontraŭ la usona imperiismo . . .»,
kaj la enhavo de ĉiuj noveloj de-
pendas de tiu politika sinteno.

Tra la liberigita zono de
zono de Laoso. Eld. Fremd-
lingva Eldonejo Hanojo
1968.

Kune kun la supre menciita ven-
is ankaŭ tiu ĉi politika broŝuro, kiu
celas doni belan, helan impreson
de la komunismo, kaj nigran, aĉan
de la alia parto de Laoso.

NOTOJ

Miela luno en Rimino estas nomo
de konkurso por junaj geedzoj. La
partoprenanoj devas — antaŭ la
deka de majo — sendi la plej
belan foton de la edzino kun ed-
ziga vesto kaj koncize respondi
al unu el tiuj ĉi demandoj: «Kio
estas la motivo de via feliĉo»
Rakontu la plej kuriozan epizodon
de via edziĝa vojaĝo» «Kiu kvali-
to de via edzo plej ĉarmas vin»
«Kiu difekto de via edzo estas la
plej simpatia kaj karakteriza».
Konkursaĵojn oni sendu al Albino
Ciccanti, 26 San Bernardino, I-
47037 Rimino. Kaj oni do havas
ŝancon gajni dek-tagan senpagan
restadon en Rimini.

Svisa Asocio de Esperanto-
Fervojistoj denove invitas al Fervoj-
semajno en Svislando. La pro-
gramo sekvas la liniojn raportita-
jn en la fervojista paĝo de N.E.
Prezo de 200 svisaj frankoj. Aliĝo
ĉe Ernst Glättli, Laurstrasse 17,
CH-5200 Brugg.

Esperanto-Gazeto (de Internacia
Instituto por Oficialigo de Espe-
ranto) organizas de januaro ĝis
marto Konkurson kun grandaj
premioj, i.a. 21-taga rondvojaĝo
inter Jugoslavio kaj Laponio.

La esperantistoj en la Jugoslava
urbo Niš proponis al Iniciata Ko-
mitato de Societo de Jugoslava-
norvega amikeco, ke ili akceptu
Esperanton oficiala lingvo.

Pola Esperanto-Asocio aranĝos
de 16—29de septembro Internacia
Esperantista Ferio, en pitoreska
montara ripozloko Miedzy-
gorze. Partoprenkotizo la egal-
valoro de 32 US-dolaroj. Detaloj
haveblaj ĉe Pola Esperanto-Asocio,
Okcidenta Regiono, WROCLAW
17, Poŝtkesto 16, str. Dubois 3,
Pollando.

*Elna Matland faris jenan prelegon en la loka
radio pentekoste 1968.*

Hvorfor ikke ett internasjonalt hjelpespråk?

Tenk Dem et øyeblikk at De bor
på en annen planet, og at De en
dag tar en svipptur innom Jorden.
De oppdager at denne lille del av
universet er kommet svært langt
i utvikling på de fleste områder,
ikke minst vitenskapelig og tek-
nisk. Og De vil sikkert se med
beundring på det en menneske-
hjerne kan utrette. Men De ville
også bli forbauset, temmelig for-
bauset. For det viser seg at disse
menneskene, som ved sitt arbeid
og sin forskning har gjort begrepet
avstand omtrent overflødig, de
snakker forskjellige språk. De
over 3 000 millioner jordboere har
et par tusen forskjellige språk,

slik at de alle må lære flere frem-
mede språk for å kunne komme i
kontakt med hverandre. Mennes-
kene på jorden anno 1968 har
ennå ikke tatt offisielt i bruk ett
felles hjelpespråk! I grunnen gans-
ke underlig. Og ikke minst under-
lig når en vet at det eksisterer et
slikt språk.

Ideen om et internasjonalt språk
er mange hundre år gammel, i sin
tid var jo både gresk og latin en
slags internasjonale språk. Men
deres utbredelse var grunnet på de
respektive rikenes makt, og da
rikene gikk til grunne, gikk det
samme vei med språkene. Disse
språkene var jo heller ikke det vi

til vanlig tenker oss med et internasjonalt språk, dertil var de for vanskelige for menigmann.

Filosofene Comenius og Leibnitz og flere andre arbeidet også med tanken om ett felles språk. Ialt har vel nærmere 300 utkast sett dagens lys, men fordi de enten var for innviklede, eller for kunstig og matematisk bygd opp, var de de ikke brukbare i praksis noen av dem.

Likevel har ikke dette vært hovedgrunnen til at tanken om et internasjonalt språk ikke har vunnet helt tilslutning overalt. Hovedinnvendingen blir å finne i folks konservatisme. Når noe nytt skal få innpass, så stritter de fleste av oss imot av alle krefter, og det har aldri vært laurbær å hente for dem som skal kjempe frem en ny tanke, historien gir oss nok av eksempler på det. Columbus, Edison og mange flere måtte finne seg i hardnakket motstand og spott og hån. For dem som har arbeidet for tanken om ett internasjonalt språk har det også vært skuffelse å høste. Likevel har tanken vunnet flere og flere tilhengere, siden det internasjonale språket Esperanto så dagens lys i 1887. Esperanto oppfyller nemlig alle de krav en måtte stille til et slikt språk, og de er ikke, og bør heller ikke være få.

Mannen som lagde Esperanto var Ludvig Zamenhof, polsk øyenlege. I sitt hjemland Polen fikk han rikelig med impulser og inspirasjon til å gå inn for et internasjonalt språk, bare i hans føde-

by Bjalystok bodde det ikke færre enn 4 nasjonaliteter, med de språkproblemer og motsetninger som det innebar.

Nå kan enhver som studerer Esperanto, selv lett overbevise seg om alle språkets fordeler, jeg skal her bare kort nevne at det er lett å lære, logisk, ordene er hentet fra nasjonalspråkene og er således ikke kunstige, det er klart, og meget vakkert: «Kiam vi aŭdas Esperanton, vi eble volas diri ke ĝi iomete similas al la itala aŭ al la romanaj lingvoj.» Dette var bare en liten smakebit av språket, og det jeg sa var: «Når du hører Esperanto, vil du kanskje si at det ligner på italiensk, eller på de romanske språk.»

Vi har altså et internasjonalt språk, fullstendig skikket til vårt bruk. Hvorfor innfører vi det da ikke ofisielt? Nå er Esperanto i bruk i alle land, verden over. Det snakkes av millioner, det er fag i hundrevis av skoler, og sendes daglig over mange radiostasjoner.

Men offisielt innført som det annet språk for alle, det er det ikke blitt ennå. Og hvorfor ikke? Menneskene har alltid så mange innvendinger, og har de ingen, så konstruerer de noen for anledningen.

La oss se litt på tilfellet om vi valgte et av nasjonalspråkene til internasjonalt. Og nå snakker jeg ikke bare om vår vestlige del av verden. Ingen tror vel at de andre stormaktene ville godta engelsk uten videre. Eller engelskmennene russisk? eller fransk? eller spansk?

eller kinesisk? Vi ville vel få enda et faremoment når det gjelder likestilling og godt forhold mellom de store.

I tillegg til dette kommer det uomtvistelige faktum at alle nasjonalspråk er vanskelige å lære. Og det er jo *forutsetningen* at alle mennesker skal lære seg et internasjonalt språk, for at alle skal ha de samme fordelene. Ulempene og vanskene vil bli store om vi velger et nasjonalspråk, ja så store at det ikke vil gi noen tilfredsstillende løsning. Løsningen blir å finne i et nøytralt, laget språk, det trenger ikke være kunstig for det. Esperanto er nettopp et eksempel på et slikt nøytralt språk. Jeg våger den påstand at de fleste som snakker mot et slikt språk, de har ikke satt seg nok inn i saken, ja de har iallfall ikke satt seg inn i språket! Et nærmere studium vil gå i Esperantos favør.

Det siste og avgjørende spørsmål blir da: Har vi virkelig bruk for et slikt språk? Greier vi oss ikke like godt uten? Vi greier oss kanskje uten, men ikke like godt! Og mange eksempler kunne nevnes i den forbindelse. Ta Nürnbergprosessen. Her møttes folk fra forskjellige land, alle med forskjellige språk, og alle meget interessert nettopp i å holde på *sitt eget* språk. Resultatet ble at alt som måtte sies gikk om en tolkecentral, smart kanskje og brukbart, men du verden så tungvint og lite tilfredsstillende, og heller ikke noen billig fornøyelse. Og FN som stadig sliter med økonomien, bruker

hvert år enorme summer til tolkene. For en eneste konferanse om traktater som ble holdt i okt. 1966 ble omkostningene ved oversettelser og tolker ialt over 2 mill. kroner. Det gjaldt *en* konferanse som varte noen få dager. Så kan en jo spørre seg selv om det virkelig kan være grunn til å klage over økonomien, når en vet at dersom FN tok i bruk Esperanto, ville en gjøre alt som heter tolker overflødig.

Titt og ofte ser vi i avisene bilder av kjente personer, folkevalgte og andre, som tar imot utenlandske besøkende, fra venstre på bildet den og den, og i bakgrunnen tolken. Hvor mye friere og bedre vil de ikke disse menneskene snakket med hverandre hvis de hadde sluppet å ha tolken i helene hele tiden?

Slik verden ser ut idag, er det store sjanser for at våre barn, i *enda* større utstrekning enn vi selv, får anledning til å komme ut, ikke bare til våre naboland, og land som ligger litt lenger borte, men til fjerne land, til helt andre kontinenter. Hvor mye større utbytte vil de ikke få, dersom de har ett felles språk å nytte seg av. Allerede med den utbredelsen Esperanto har idag, vil en få nytte av språket, det kan jeg selv innestå for, fordi jeg i en årrekke har reist som turist, riktignok bare i Europa, men dog i 17 land.

Den som snakker Esperanto, befinner seg på et *nøytralt* språklig grunnlag, og det er meget verdifullt idag. Esperanto tilhører ikke

noen bestemt nasjon, og gir derfor ingen anledning til å hovere over sin neste. Det gir tvertimot en sunn og positiv innstilling til andre land og folk, en innstilling som jeg vil påstå er litt av en nødvendighet idag. Vi befinner oss på kanten av en avgrunn, iallfall har vi alminnelige mennesker følelsen av det, vi vet at bare en samling av alle gode krefter kan redde oss ut av den elendighet vi selv har

Rudolf Dreyer:

Iom pri la longaj, longaj noktaj

Estas la dudekunua. Mi jam diris Bonan nokton al la flegistino, kiu estingis la lumon kaj kuntiris la tirkurtenojn. Nun mi havas antaŭ mi naŭ horojn kaj duonon sen dormo. Mi ja diris: «Dankon, mi ne bezonas» al la kuiristino kiu proponis dormigilon.

Dum kelke da tempo mi estis sendorma kaj ŝajnis al mi, ke la dormigilo ne helpis. Mi havas malbonan sperton.

Mi estas laca, sed ne dormema. Kaj mi havas la longan, longan nokton antaŭ mi. Mi devas kuŝi dorse ĉar la bandaĝo malhelpas al mi kuŝi sur la flankoj.

En la ĉambro tri pacientoj, mi mem inkluzive. La aliaj jam dormas. Unu laŭtege ronkas, kaj post ĉiu ronkado sekvas krako -bum! La ronkado tamen ne ĝenas min. Kiel feliĉa li estas, kiu tiel profunde dormas, mi pensas.

brakt oss inn i. En tilnærming mellom folkene vil være et gode og en nødvendighet, og Esperanto er i høy grad med og skaper en sterk følelse av fellesskap med andre nasjoner. Og så kan en undre seg på hvor lang tid det skal gå før vi offisielt tar i bruk et internasjonalt språk? Og jeg er fristet til å slutte med de velkjente ord: «Hvi skrider menneskeheten så langsomt frem?»

Mi rigardas en la mallumon. La pensoj ĉirkaŭvibras en mia kapo. Ĉu mia asistanto majstros la laboron? Li ja estas tiel nova kaj sen rutino. Li devas fari viziton al mi por konferencado. Mi certe povos esti utila al li —. Ĉu mia edzino estas timplena? Mi aŭdis, ke ŝi telefonis al la kuracisto. Ĉu miaj nepoj estas sanaj? Ambaŭ filinoj de mia filo malvarmumis. Ili tusadis tiel malbone lastatempe - -

La dorso doloras. Mi devas ŝanĝi pozicion. Unu colo sufiĉos. Mi penegas trovi novan pozicion. Mi febras. Ŝvitgutoj komencas fluadi malsupren je la dorso kaj malsekiĝas la subvestojn. — De tre malproksime mi ekvidas lumon alproksimiĝantan. Ŝajne estas okulo de ia veturilo. La rapideco estas terura. La lumo ĉiam pligrandiĝas kaj plenigas pli kaj pli la lokon. Ĝi venas rekte kontraŭ mi, — nun kontraŭ min . . . Bum! — mi falegas — sed strange, la falo estas mola, ho kiel mola . . .

Nun mi estas en kelo, profunde sub la tero. Estas malvarmege, kaj

mi flaras salon. Subite mi sentas malvarmon.

Mi certe devas esti dorminta momenton. Pro la ŝvitado mi estas tramalseka, kaj mi komencas tremi pro frosto. Necesas alvoki la flegistinon por ekhavi novan, sekan ĉemizon. Kioma horo estas, mi demandas al ŝi. Estas la dudekdua kaj tridek, ŝi respondas.

Hu — ankoraŭ restas multaj horoj, antaŭ ol krepuskiĝos.

La tempo malrapide pasas. Miaj pensoj flirtas, nur interrompitaj de febraj revoj.

Sur la muro mi subite ekvidas afiŝon, kiu tekstas per ornamaj literoj:

La prezentado komenciĝos je la oka precize.

Tuj poste la afiŝo malaperas kaj anstataŭ ĝi scenejo estas fiksita sur la muro. Sur la scenejo mi vidas du virojn vestitajn kiel nobeloj kaj kun larĝgrandaj ĉapeloj. Unu sidas en fotelo. «Donu al mi vian manon,» li diras al la alia staranta en la mezo de la planko. Nun tiu ĉi faras graciajn danĉpaŝojn kontraŭ la alia, riverencas antaŭ li kaj etendas la manon — sed de tiom da distanco, ke la alia ne kapablas preni ĝin. Fine li kuŝiĝas sin sur longan benkon —, kaj la bildo malaperas. Nun nova afiŝo sur la muro. «Daŭrigo sekvas merkredon je la oka». — Sed vane mi atendas la daurigon . . .

Jen mi estas en malgranda urbo. Ĉi tie mi renkontas la fratinton de mia iama plej bona amikino. Ŝi nur salute klinas la kapon kaj plueniras. Tuj poste mi ekvidas

mian amikinin. Mi kuras renkonte al ŝi, salutas ŝin kaj etendas al ŝian manon. Ŝi prenas ĝin kaj levas ĝin al sia buŝo kaj — ho, kia feliĉo! — ŝi kisas la fingrojn, ĉiujn, unu post la alia. «Ni renkontiĝu morgaŭ ĉe . . .»

Kaj jen mi vidas min iradi sur ŝoseo, longtempe, ho, kiel longtempe. Mi laciĝas, etendas mian korpon, trovas bonan ripozpozicion kaj — ekdormas.

Post kelkaj minutoj la pordo estas malfermata kaj la flegistino kaj kun la termometro. Bonan tagon, ŝi diras.

Estas la sesa matene.

Kaj nova tago komenciĝos.

La koro ĝojegas

La koro ĝojegas pro venk' de Jesu',
la tomb' iĝas lito
kun bona invito
al paco kaj ĝu'.

Ripozon la tombo nun donos al mi
de mia laboro,
de penoj kaj ploro,
ĉar mortis Mesi'.

Kaj iam mi iros el ĉerka trankvil',
vestaĵon ricevos
— ĝojegi mi devos —
de Dia la Fil'.

Savanto, mi estas al Vi fianĉin',
kaj al Via gloro,
ĉiela Sinjoro,
Vi jam prenos min!

Laŭ «Mit hjerte sig fryder»
de Anna J. Borrebye.
(El «Preparoj»)

La Komunumestro de Løten salutis

Por la ĉefparto de la homaro, interrilatoj trans la landlimoj ĉiam estis celo.

Verŝajne la ekonomiaj rilatoj kaŭzis, ke nur malmultaj sukcesis plenumi niajn dezirojn atingi tiun celon.


La ĉiam plibonigita ekonomio, kune kun pli da libertempo, ebligis al pluraj homoj vojaĝi eksterlanden.

Sed ni, kiuj nun iom maljuniĝas, kaj kiuj dum nia juneco ne havis eblecon studi la grandajn mondlingvojn en la lernejo kiel la junularo nuntempe, timas vojaĝojn pro la lingvaj malfacilaĵoj.

La internacie agnoskita helplingvo Esperanto ĉiam allogis min, kvankam mi neniam trovis tempon por lerni ĝin. Mi tamen tre bone komprenas la altan valoron de Esperanto en internacia kunlaboro, kaj estas mia espero, ke la Internacia Lingvo pli kaj pli disvastiĝu.

Mi vere ĝojas ke Norvega Esperantista Ligo ĉijare aranĝas sian 41an Norvegan Kongreson en Løten, kaj mi esperas, ke la gepar-toprenantaro bone fartu en ĉi tiu Orient-Norvega regiono. Al ĉiu mi esprimas: Koran bonvenon al Løten!

L. Hjelsengsvæen
Komunumestro



L. Hjelsengsvæen
Komunumestro

La internacia feriaj Esp.-kursoj de Helsingör okazos 20.-26. de julio 1969 en La internacia Altlernejo (tute moder-nigita). Venu al Danlando por ĝui belan ferio-semajnon en vere Esperanta rondo. Prospekto senpage havebla ĉe L. Friis

Ingemannsvej 9
DK-8230 Åbyhøj,
Danlando.

NB. Aŭtunaj feriaj Esp.-kursoj okazos en la altlernejo JUNAJ HEJMOJ ĉe Århus, Danlando, 19.-25. de okt. Programo jam havebla ĉe L. Friis.




FERVOJISTA PAĜO

ORGANO DE NORVEGA
ESPERANTISTA FERVOJISTA
ASOCIO — NEFA

Redaktoro: Odd Kolbrek,
Kaldbakkstubben 22, Oslo 9

Interkomunikigo kaj
«Sekura Trafiko» kiel moti-
voj por noveldonitaj poŝt-
markoj.



Antaŭe ofte aplikigis interkomu-nikiĝo kiel motivo por norvegaj poŝtmarkoj, sed pro la 100 jara jubileo de «Horarlibro por Norvegujo» eldonigas la 24 an de marto ĉijare verdkolora poŝtmarko en valoro de 50 oeroj — honore al la interkomunikiĝo — tion ĝi, pro nia longdistanca kaj malfacile trafikebla lando, meritas.



La saman tagon eldoniĝas, kiel propagando por la organizaĵo «Sekura Trafiko», ruĝ — kaj grizkoloraj poŝtmarko en valoro 65 oeroj.

La Ila Feriasemajno en Svisujo
1969

okazos de la 24 an de ĝis la 30 an de aŭgusto. Petu pri programo kaj informoj ĉe S.ro Ernst Glättli, Laurstrasse 17 CH Brugg Svisujo.

Dum la jarkunveno de NEFA
la 16 an de februaro 1969

jenaj estraranoj elektiĝis:

Prezidanto Per Johan Krogstie,
viceprezidanto Erling A. Rygge,
sekretario Per Engen, kasisto kaj redaktoro Odd Kolbrek, estraranoj Kjell O. Karlsen kaj Øivind Lund, fakdelegito de UEA Jon Moe.

Koran dankon al NEFA
pro la belaj floroj kiujn mi ricevis
dum mia malsaneco.

Gunnar Flenvang.

Se vi havas intereson pri la naturo, speciale pri birdoj, fariĝu membro de ORNITOLOGIA RONDO ESPERANTLINGVA, kies revuo «La Mevo» entuziasmigis vin. Jarkotizo: 7 n.kr. Landa deligito: Lars Kåre Hunnes, Reidulvs gt. 15, 7000 Trondheim, poŝtgirkonto 8 77 62.

Sciigoj de N. E. L.

Taskotabelo por la kluboj. — *Aprilo:* Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato. La kasisto sendas al N.E.L. kaj al la distrikto kotizojn kaj liston pri la malfruiĝintaj kaj eventualaj novaj membroj.

La Liga Estraro.

Al ĉiuj kluboj kaj membroj.

Per ĉi tio ni kuvokas ordinaran landan kunvenon de Norvega Esperantista Ligo en Budor Turisthotelo, Løten, la 21an kaj 22an de Junio 1969. La inaŭguro okazos la 21an je la 12.00, la laborkunsidoj komenciĝos je la 14.00.

La tagordo de la laborkunsidoj, la jarraporto kaj kalkuloj pri 1968 aperos en la venonta numero de Norvega Esperantisto.

Blankedoj kaj informoj pri reprezentigo estos sendataj al la kluboj kun aparta cirkulero. Atentu ke ĉiuj membroj, klubanoj kaj rektaj membroj, kiuj ĉeestos, nun havos ankaŭ voĉdonrajton.

La kunveno okazos en la kadro de la 41a Norvega Esperanto-Kongreso, kaj ni esperas ke la membroj grandnombre partoprenos.

La Liga Estraro.

NORSK ESPERANTO-FORBUND
(*Norvega Esperantista Ligo*)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30
Kontoradrese: St. Olavsgate 27 III, Oslo
Telefon: 20 20 83
Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30-16.30

Turisma Servo: Boks 942, Oslo.
Postgiro 100.32

ESPERANTOFORLAGET A/S
(*Eldonejo Esperanto A/S*)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31

Kontoradrese: St. Olavsgate 27 III, Oslo
Telefon: 20 20 83

Ĉefdelegito de U.E.A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,
Oslo 6. Postgiro 133.29

La redakcio:

Privata adreso de la ĉefredaktoro:

Johan Hammond Rosbach,
Hulderveien 17 B, N-1700 Sarpsborg. —
Uzu tiun adreson, kiam temas pri urĝaj
sendaĵoj. — Telefono: 54 727